# *Denuncoj pri krimigo de protestoj flanke de la kongreso gvatemala*

*Image not found or type unknown*

Gvatemal-urbo, nov 23 (RHK) Humanitaraj grupoj denuncis hodia? ke la prezidanto de la kongreso de Gvatemalo, Allan Rodríguez, krimigas la socian proteston kaj la organizojn sociajn, post kiam la funkciulo taksis “pu?isma” la manifestacion faritan sabate.

La? raportis la televida ?eno Telesur, la prezidanto de la kongreso aperis en videomaterialo kune kun kelkaj membroj de la kongresa estraro, registrita en la sidejo de la ministerio de defendo, la? denuncis amaskomunikiloj de tiu centramerika lando.

En sia parolado registrita, Rodríguez asertis ke la amasa manifestacio pasintsabata, kiu petis vetoi la polemikan bu?eton aprobitan por 2021 kaj la rezignon de la prezidento Alejandro Biammattei, “estis anta?e kaj strategia planita”.

“La evidenta celo (estis) rompi la konstitucian ordon kaj aliri la povon, kiel parto de malstabiliga strategio, kiu sekvis la linion de aliaj landoj”, asertis la kongresestro.

Same, Rodríguez sciigis ke la kongresa estraro decidis suspendi la sendon al la ekzekutiva povo de la dekreto 33-2020 de la ?enerala bu?eto por 2021.

La opozicianta deputito Lucre Hernández, tamen, rifuzis tian “decidon” de Rodríguez komentante per Tvitero, ke “nek la estraro nek ?iaj aliancitaj blokoj havas la kompetenton arkivi le?on aprobitan de la

Kongresa plenkunsido.

La paca protesto farita fronte al la Nacia Palaco, postulanta rezignon de la prezidento Giammattei estis forte subpremita de la Nacia Civila Polico (PNC), kio provokis 36 arestitojn kaj almena? deko da vunditoj kaj okulaj lezoj.

Fonto: Telesur

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/240482-denuncoj-pri-krimigo-de-protestoj-flanke-de-la-kongreso-gvatemala

Radio Habana Cuba